

NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª deksstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 esperantobi@gmail.com

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. Familia: 70 €.

KUTXABANK(BBK)-konto: 2095-0141-41-2218001550

MAJO/JUNIO 2016

Nro. 108 (3/16)



Hispana kongreso okazinta en Herrera del Duque (Badajoz)

(De la 30-a de junio ĝis la 4-a de julio 2016)

Jen la 4 bilbaoanoj kiuj partoprenis ĝin (Paco López, Jesús M. García, Guada Casilla kaj Iciar Arteché)

LERNOLIBRO EN LA EŬSKAVASKA LINGVO KAJ EŬSKA LERNOLIBRO POR ESPERANTISTOJ.



Aitor Arana, fama eŭska verkisto kaj aktiva esperantisto sendis jenan sciigon al la reta adreso de nia Grupo:

Ĉi-jare, antaŭ nur du monatoj, estis reeldonita la eŭsklingva metodo "Esperantoa ikasgai" por lerni Esperanton. Ĝi aspektas multe pli moderne ol la antaŭa eldono, kaj la teksto estas retuŝita kaj ĝisdatigita.

Aldone, jam la venontan semajnon aperos la lernolibro "Ni lernu la eŭskan", de Wim Jansen kaj Aitor Arana, por esperantistoj, kiuj volus koni aŭ lerni la eŭskan lingvon.

Kiel aŭtoro kaj kunaŭtoro de ambaŭ libroj, estus plezuro al mi sendi po unu ekzempleron por via biblioteko en Grupo Esperantista Bilbao.

Ricevu koran saluton, ĉiam amike. Aitor Arana.

(Aitor Arana. 12/05/2016)



Noto: Kore ni dankas al Aitor Arana tiun donacon kaj la fakton ke li ĉiam havas nian Grupon en siaj pensoj. Ambaŭ libroj estas aĉeteblaj ĉe la libroservo de UEA.

75-a HISPANA KONGRESO.

(Herrera del Duque (Badajoz). 30 jun. / 04 jul. 2016)

Kvar bilbaoanoj veturis aŭtomobile ĝis la malproksima urbo Herrera del Duque por partopreni la 75-an kongreson de Hispana E-Federacio. La urbo troviĝas en la provinco Badajoz, sed en regiono nomita "Siberio" pro ĝia malproksimeco kaj izoliteco. Interesa kongreso kun ekskursoj al Guadalupe, al Trujillo kaj al Cáceres. Ankaŭ estis nomumita nova estraro de HEF.



Maldekstre, la prezidanto de HEF, Toño del Barrio, kun la bilbaoanoj, dum la kongreso.

Ĉi-sube, la nova estraro de HEF.



CUOTAS DEL AÑO 2016.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este "Nia Ponto". Y no olvidéis que **las cuotas han cambiado desde este año 2016:**

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € almes)

¡¡Muchas gracias por vuestra colaboración!!

VENONTAJ E-ARANĜOJ.

29 okt- 1 nov. 20-a Andaluza Kongreso de Esperanto - en Antequera (Málaga). Temo: "Esperanto kaj Naturo, Ĉielo kaj Tero". Prelegoj, ekskursoj, Torcal, Cuevas de Menga, Observatorio, ktp Antequera geografía centro de Andaluza. Inf.: Andaluza Esperanto Unuiĝo (AEU) rete: angelarquillos@gmail.com. Blorgejo: andaluciaesperanto.blogspot.com.es



Esperanto-karavano 2017

julio 2017. Karavano al Seulo-Rusio-Koreio. Korea Esperanto-Asocio invitis UKon 102 de jaro 2017 en Seulo, Koreio. La Vojaĝo anoncas novan projekton, Karavanon al Seulo por partoprenantoj de planata kongreso. Laŭ anticipa plano ĝi itineros laŭ la fama Trasiberia fervojo (9298 km/ 4,607 mejla), la plej longa fervoja itinero en la mondo. inf.: La Vojaĝo.

22 - 29. julio. Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017 - en Seulo, Suda-Koreio. Inf.: x, rete: - Retejo ĉe UEA: <http://www.uea.org/kongresoj/>

5 - 12 aŭgusto. IJK, Internacia Junulatra Kongreso - en urbo Aneho en Togolando

KIAM, KIE, KIO OKAZAS? - INTERNACIA KALENDARO

pri Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj, festivaloj!

La "Internacia Kalendaro" listigas ĉiujn konatajn Esperanto-renkontiĝojn, kongresojn, festivalojn, kiuj akceptas vojaĝantajn esperantistojn kiel partoprenantojn.

Adreso de la Internacia Esperanto-Kalendaro: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Se vi ŝatus esti kunlabora membro en nia teamo, kontaktu nin: *Szilvási László*, szilvasi@eventoj.hu

(Ret-Info. Lingvo-Studio, LS. <http://www.eventoj.hu>. 17/06/2016)

Don Quijote de La Mancha, en Esperanto en bita formato.

(Eblas aĉeti ĝin en la E-Grupo de Bilbao. Prezo: 6,00 eŭro)

Hispana Esperanto-Federacio publikigas la unuan kompletan eldonon de la plej fama verko de la hispanlingva literaturo, "Don Quijote de La Mancha", en Esperanto kaj en bita formato.

"La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha" estis prezentita la 1-an de julio en la kadro de la 75-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝis en la Palaco de Kulturo de Herrera del Duque (Ekstremaduro) inter la 30-a de junio kaj la 4-a de julio 2016.


"La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha" estas unu el la simboloj de la hispana kulturo, kaj la tradukado de la verko al Esperanto estis dum multaj jaroj unu el la ĉefaj streboj de la esperantistoj en Hispanio kaj internacie. Post diversaj partaj provoj, fine en 1977 povis aperi la kompleta traduko de la verko, redaktita de Fernando de Diego kaj eldonita de la Fondumo Esperanto de Zaragozo. Dum la lastaj jaroj skipo de esperantistoj ligitaj al Hispana Esperanto-Federacio intense laboris por produkti elektronikan version, kiu ebligas pli facilan aliron al la romano, kaj fine tiuj penoj kompletiĝis en tiu ĉi jaro, koincide kun la kunmemoro de la 400-a datreveno de la morto de la aŭtoro Miguel de Cervantes.

La verko estas nun je la dispono de ĉiuj parolantoj de la internacia lingvo, libere kaj senpage, en formato epub, en la Bitoteko, la bita biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio. Ĝi ankaŭ elŝuteblas el la Biblioteka Virtual Miguel de Cervantes, la plej grava hispana institucio zorganta pri la hispanlingva literaturo en elektronika formato, kun kiu HEF interkonsentis pri la samtempa disponigado al la ĝenerala publiko. La adreso en tiu ĉi retejo estas <http://www.cervantesvirtual.com/obra/la-ingenia-hidalgo-don-quijote-de-la-mancha/>.

Vi povas trovi la ligilojn al la verko kaj pliajn informojn pri la projekto en la retadreso <http://esperanto.es/quijote>.

NOTO: La memorbastoneto kun "La inĝenia hidalgo don Quijote de La Mancha" estas **aĉetebla en la E-Grupo de Bilbao. Prezo: 6,00 €**

Kaj eĉ en tiu neimagebla cirkonstanco, ke vi ne interesiĝas pri tiu elstara verko de la mondliteraturo, sciuj ke vi povas profiti la preskaŭ tutan memorbastoneton por viaj privataj aferoj ĉar restas multe da libera loko en ĝi kaj eblas enmeti kian ajn bitan dosieron.



El Quijote en memoria USB (pen-drive). Se puede comprar en el Grupo de Bilbao. Precio: 6,00 €.

El pen-drive tiene suficiente capacidad para contener El Quijote y dejar aun espacio para poder almacenar documentos personales, así que es toda una ganga. Aprovéchala antes de que acaben los 15 ejemplares de que disponemos.

TERUEL: NOVA E-ASOCIO.

BONVENON kaj GRATULON al samideanoj de Teruel kiuj ekigis novan E-asociacion en tiu urbo. Nome: "LIBERANIMO".

"Teruel ja ekzistas" kaj nun same en la mapo de E-grupoj...



Ili organizis antaŭ ne multe Esperanto-semajnon kun ekspozicio kaj du prelegoj (Toño del Barrio kaj Alberto Granados). [Kaj permesu al mi esprimi DANKON al Alberto Granados, la elstara animo de "Liberanimo"]

Do, la lasta E-grupo aperinta en Hispanio okazas en provinco kie aperis unu el

la pioniraj (en 1903) kaj la unua en Aragono.

P.S.: Jen informado ricevita

Os envió una imagen de la fundación de la asociación esperantista "Liberanimo" ("espíritu de libertad"), hoy lunes 23 de mayo en Teruel.

En los próximos días nos entrevistaremos con la alcaldesa de Teruel para solicitarle que se dé el nombre de Esperanto a la plaza de la salida del ascensor de San Julián.

La asociación inicialmente está formada por 8 personas. Puede inscribirse quien quiera. La cuota anual es de 10 euros.

(Lorenzo Noguero. 25/05/2016)

ESPERANTO EN SOMERA UNIVERSITATA KURSO.

Hispana Esperanto-Federacio kunlaboris en somerkurso de la Universitato de Ekstremaduro (UEX) titolita "En la limoj de la lingvaĵo: artaj lingvoj kaj komunikaj fikcioj", kiuj disvolviĝos dum la 11a kaj 12a de julio en la Instituto pri Modernaj Lingvoj de Kazereso (Cáceres).

La kurso celis konigi kelkajn el la projektoj de lingvoj kreitaj laŭlonge de la historio, kun tre diversaj celoj. La lecionoj analizis la lingvojn filozofiajn kiuj proponas specialan kategoriigadon de la mondo kaj la pensado (Caramuel), la lingvojn planitajn kiel lingvajn eksperimentojn en la fikcio (Laadano), la lingvojn stetikajn (Xul Solar), la lingvojn celantajn faciligi la internacian komunikadon kaj la liberan interŝanĝon de ideoj (Esperanto) aŭ la lingvojn montrantajn alternativajn mondojn en la kadro de la sciencfikcio (Klingono). Aliflanke, ronda tablo debatis la eblajn limojn de la lingvo en la kreado de artaj sistemoj.

La lecionon pri helpaj lingvoj instruis la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio.

("La Bitbulteno". Nro. 28. 24/06/2016)

TRA LA MONDO ...

La dua Heidi-libro „Heidi povas apliki, kion ŝi lernis“ aperis sabate la 2-an de julio 2016 en Esperanto!



Sub ĉiuj kateĥismaj kaj retorikaj disputoj pri nia asocio ni ne forgesu nian veran kaj pragmatikan laboron por Esperanto. Miaflanke tio estas la aperigo de la dua Heidi-libro en tiu-ĉi-jaro, kies inaŭguro okazos la sabaton 2-an de julio 2016 en Hirzel, en la naskiĝloko de la mondfama kaj plej kontata svisa verikstino Johanna Spyri.

Ŝiaj du Heidi-libroj apartenas al la monda literaturo kaj apartenas al la plej multaj legataj infanlibroj de la tuta mondo. Esperanto estas nun la 52-a lingvo, en kiu Heidi aperis.

Pliaj detaloj ĉi-tie en mia blogo, kie vi ankaŭ povas mendi la du librojn:

<http://informejo.com/heidi-auf-esperanto---heidi-en-esperanto.html>

(Dietrich Michael Weidmann. 28/06/2016)



Esperanto por Eŭropa Komunumo.

Post la foriro de Britio el Eŭropa Unio, estis diversaj reagoj de esperantistoj, kiuj vidis pli da ebloj por ke Esperanto fariĝu la oficiala lingvo de tiu komunumo. Inter la unuaj, estis tiu-ĉi letero al Prezidanto de UEA:

Kara S-ro Prezidanto,

Tiel nomata Brexit malgraŭ multaj ĝeneralaj mankoj havas apartan avantaĝon por Esperanto. Plej granda (fakte sola) landa komunumo uzanta la anglan lingvon, Britio forlasas EK-n.

Aperis unika ebleco enigi la lingvon Esperanto kiel labora lingvo ene de UK. Tiaj provoj jam okazis sed nun la ĉanso estas pli ebla.

Mi proponas laŭ niaj povoj, uzante ĉiujn rimedojn, trakti tiun kun EK. Ni havas Vian kapablon, rezoluciojn de UNESKO, spertajn kaj influajn reprezentantojn en EK, ktp.

La Komitato kaj freŝbakita aktiva juna Ĝenerala direktoro de CO fine montru siajn kapablecon, efikon kaj insiston en ege grava afero. La celo indas tion fari!

Mi opinias ke la landaj asocioj Vin subtenos.

(Eŭgeno Kovtonjuk, Prezidanto de UkrEA, A-komitatano. 25/06/2016)

103-a Universala kongreso en Lisbono (Portugalio).

De la 25-a de julio de 2018 ĝis la 31-a de julio de 2018

Portugala Esperanto-Asocio Rua Dr. João Couto, 6-r/c A, PT1500-239 LISBOA Benfica, Lisboa

www.facebook.com/events/629033787272431/

Mondo-mapo pri esperantistoj.

Lastatempe mi kreis la retejon <http://esperantujo.directory/> – ĝi estas simpla mondo-mapo de esperantistoj. Mi kreis ĝin por montri ke estas esperantistoj ĉie en la mondo, kaj ke Esperanto ja estas vivanta lingvo.

Do, bonvolu registriĝi, alŝuti foton pri vi, kaj ni plenigu ĝin kun amikaj vizaĝoj. Espereble ĝi helpos novajn esperantistojn trovi sin reciproke.

(Martin Rue. *[En la FB-grupo "Esperanto"]*)

Ndlr: La mapo povas esti impresa ilo por montri kaj pruvi la realan disvastiĝon de Esperanto-parolantoj. Por tio estas necese, ke registriĝu esperantistoj ankaŭ el malgrandaj, foraj kaj neeŭropaj landoj. Dankojn pro via eventuala helpo en tiu tereno. -

(Fonto: Ret-Info, LS. 20/06/2016)

Antaŭ 111 jaroj, aperis la gazeto "Esperanto".

Jes, la unua numero aperis la 18-an de junio de 1905, de Paul Berthelot (redaktoro: Charles Lambert).

La unuaj vortoj estis:

Al Leganto:

"Ankoraŭ unu gazeto esperantista! – vi certe ekkriis vidante tiun ĵurnalon – ĉu ne estas jam sufiĉe, eble jam tro, ĉar kelkaj nur kun peno vivadas! Kial tiu nova organo?"

Al tiu demando ni volas respondi.

Vera esperantisto estas esence propagandisto [...]

Eĉ aperis iom da humuro:

ŜI: Mi ĉiam portas kun mi tiun am et ist on kaj tiun am ul et on...

LI: Kaj ili ne ĵaluzas?

ŜI: ? ! ?

Se iu scivolemas, eblas aliri al tiu unua numero (kaj al aliaj de tiu kaj de aliaj gazetoj):

Jen la unua numero de "Esperanto": [ÖNB-ANNO - Esperanto](#)

Jen pri diversaj revuoj: [Österreichische Nationalbibliothek - Scanned Esperanto-journals](#)

(Lorenzo. 18/06/2016)

Kuriozaĵo legita en hispana ĵurnalo.

En la hispana ĵurnalo "El País", la merkredon 24-an de aŭgusto, estas novaĵo pri somera universitato okazinta en Katalunio, ene de kiu oni petis la oficialigon de la kataluna kiel la sola lingvo de katalunio. Kaj ene de tiu novaĵo eblas legi la jenon:

*"Bernat Joan, exsecretario de política lingüística de la Generalitat, proposo una multioficialidad. Joan defendió que el inglés sea también oficial. (...) A raíz de una pregunta del público que proponía reconocer el **esperanto** como lengua oficial en la Cataluña independiente, y rechazar el inglés por ser "un idioma que se nos impone de manera imperial", Joan apuntó que la oficialidad del inglés es un acierto porque "la mejor manera de ir contra el imperio es estando dentro de él".*

(“El País. 24/08/2016)

Morto de REINHARD SELTEN Nobel-premiita esperantista sciencisto.



La 23-an de aŭgusto Esperantujo perdis sian plej eminentan scienciston per la forpaso de prof. d-ro Reinhard Selten, naskiĝinta la 5-an de oktobro 1930.

En 1961 li doktoriĝis pri matematiko en la Goethe-Universitato de Frankfurto-ĉe-Majno, kie en 1968 li akiris docentan diplomon. En la studjaro 1967-1968 li estis gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Berkeley. Li estis profesoro en la Libera Universitato de Berlino 1969-1972, en la Universitato de Bielefeld 1972-1984 kaj ekde 1984 en la Universitato de Bonn. De 2006 ĝis 2014 li gvidis esplorprojekton pri eksperimenta ekonomiko de la Nordrejna-Vestfalia Akademio de Sciencoj kaj Artoj. Dek unu universitatoj asignis al li honoran doktorecon.

En oktobro 1994 Selten fariĝis, kun du usonaj ekonomikistoj, laŭreato de la Nobel-premio pri ekonomiko pro sia elstara kontribuo al la ludoteorio. Krom pri ludoteorio, Selten faris pioniran esploradon pri eksperimenta ekonomiko kaj pri limigita racieco. En lia ampleksa scienca bibliografio, ĉefe en la germana kaj angla, troviĝas ankaŭ la verko *Ĉu mi lernu Esperanton? Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj* (1982; 2-a eld. 1995), kunaŭtorita kun Jonathan Pool.

Pri sia esperantistiĝo Selten mem rakontis jene: "Mi komencis lerni Esperanton kiel 17-jarulo aŭtodidakte. Fakte, mi vidis kaj legetis Esperanto-libron jam pli frue en Breslau, kie mi vivis ĝis februaro 1945. Mia patro estis esperantisto, sufiĉe aktiva en la blindula Esperanto-movado. Tamen, la lingvon mi eklernis ne sub lia rekta instigo, nur sufiĉe longe post lia morto."

En Frankfurto (ĉ. 1960) Selten ekzameniĝis kiel Esperanto-instruisto kaj estis vicprezidanto de la loka klubo. Li konatiĝis kun sia edzino pere de Esperanto kaj instruis la lingvon ankaŭ al sia pli juna frato. Li estis, same kiel la edzino, dumviva membro de UEA ekde 1969 kaj membris ankaŭ en Germana Esperanto-Asocio kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). En la 84-a UK en Berlino (1999) li estis rektoro de la Internacia Kongresa Universitato.

Sub la redaktora nomo de Selten aperis la diverslingve eldonita studkolekto *La kostoj de la eŭropa lingva (ne)komunikado* en 1997. Kun Helmar Frank li publikigis la libron *Für Zweisprachigkeit in Europa; Por dulingveco en Eŭropo* (2005).

En la Eŭropa Parlamento Selten pledis por Esperanto kiel invitita parolanto la 9-an de majo 2007, okaze de la 50-jariĝo de la Roma Traktato. En la eŭropaj elektoj en 2009 li estis la ĉefkandidato de la germana sekcio de la partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

(Informis Pedro Hernández, pere de retpoŝto. 01/09/2016)

Alia forpaso: DETLEV BLANKE.



La 20-an de aŭgusto mortis **Detlev BLANKE**. Li naskiĝis la 30-an de majo 1941 en Neumünster (GDR); li estis lingvisto, interlingvisto kaj esperantologo (post universitataj studoj instruisto de la germana kaj geografio). Kun sia edzino Wera Blanke li laboris interalie en la kampo de terminologio kun speciala atento al la verkaro de Eugen Wüster. Li estis honora prezidanto de Gesellschaft für Interlinguistik. En 2011 li estis elektita honora membro de UEA.